

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerc“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page advokato, Edinburgo  
Ernest Archdeacon, Pariso  
I. Gili Noria, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabrikk-  
direktoro, Kaunas.

N-o 201  
20. 7. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Kōln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro  
aŭ 0,20 sv. fr. por landoj, kies valuto  
sufiĉas maksimume 50%; por ĉiuj aliaj  
landoj 0,06 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de  
0,20 sv. fr. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.),  
en „Internacia Komerc“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgo, Horrem, Kaunas, Pariso, Warszawa

XI. Bulgara Kongreso en Ruscuk 27–29 julio. — IV. Rumana Kongreso en Arad 2–5 aŭgusto. — Pola Kongreso en Warszawa 6–8 aŭgusto.

Dum tiuj tagoj oni malfermis en Stockholm la Kongreson de la Universala Poŝta Unio. La tuta mondo praktika estas interesata pri la traktadoj de la kongreso, kiu daŭros proksimume 6 semajnojn. Nin esperantistojn ĝi interesas speciale pro tio, ke peticio por la enkonduko de Esperanto en la poŝtan servon kun nun 13 539 subskriboj el 56 landoj estas submetita al la kongreso.

Stockholm estas belegra urbo. Por tion montri al niaj legantoj ni dediĉas tiun ĉi numeron al priskribo de Stockholm kun kelkaj ilustraĵoj. Ni samtempe publikigas mallongan informan noton pri la Sveda Esperanto Federacio.

### La tutmonda poŝtkongreso en Stockholm.

La VIII-a tutmonda poŝtkongreso malfermiĝis solene la 5 julio je la 3-a horo (15) en la regna salono de la reĝa palaco en Stockholm, kun pli da pompo kaj parado ol oni kutimas al kongresoj.

Krom ĉiuj delegitoj al la kongreso kun sinjorinoj en la malferma soleno partoprenis la reĝo Gustav V kaj la reĝino Victoria, la princo-verkisto Wilhelm kaj la princo-pentristo Eügen, la ministro de la sveda registaro kaj de la fremdaj legacioj kun ministro-edzinoj, militistaj kaj civilaj ŝtataficistoj altranganĝaj k. c., entute 700 homoj.

La oficiala lingvo de la kongreso estas la franca, ĉiuj parolantoj do uzis tiun ĉi lingvon. Tamen en la laborkunsidoj aliaj lingvoj estas permesataj.

La ministro de komunikaj aferoj s-o Lübeck en la nomo de la registaro salutis al la kongreso bonvenon, dirante, ke koncerne la poŝton ne ekzistas en la tuta mondo limoj inter la landoj, kiujn oni konsideru kiel unu solan landon kun la samaj rajtoj kaj devoj, unuigatajn per ligiloj pli firmaj sekve de ĉiu kongreso. La rekonstrua laboro jam komenciata de la Universala Poŝta Unio por ripari la damaĝojn kaŭzitaĵajn per la mondmilito certe daŭriĝos ĉe ĉi tiu kongreso en bona konsento.

Post tio la reĝo deklaris malfermita la poŝtkongreson, salutante kun sincera kontenteco la delegitojn bonvenintaj en Svedujon. Ni ĉiuj, diris la reĝo interalie, konas la grandegajn servojn, kiujn la Universala Poŝta Unio en la unuaj kvindek jaroj de sia ekzistado faris jam kaj daŭre faras ne nur al la komerc kaj industrio de la tuta mondo, sed ankaŭ al la afero de la civilizo kaj de la internacia konkordo. Bondezirante feliĉan rezulton por pliperfektiĝi tiun grandan kreaĵon, la reĝo ankaŭ esperis, ke la restado en Svedujo donu sole agrablajn impresojn, por ke la kongresanoj kunportu de ĉi tiu ĉi lando kaj de ĝia ĉefurbo daŭran kaj humanan memoron.

Post la parolo de la reĝo la hungaro, suba ŝtatestretario Fejér, en sia rolo de plejaĝa prezidanto, elokvente esprimis la dankesentojn al la gregoj pro la akcepto.

Fininte tiun ceremonion oni prenis teon kaj refreŝigaĵojn en alia parto de la palaco kiel la gastoj de la reĝo kaj la reĝino.

En la sama vespero la urbo Stockholm invitis al postmango en la urbdomo la kongresanoj aliajn honorgastojn. Tie la ĉefministro, ekskelceno Trygger, diris tre atentindan kaj atentitan orator-

ajon. Spite al la batalo kaj kontraŭeco de individuoj kaj de popoloj tamen la solidareco de la homaro, la ligeco de la bono de unu kun la prospero de aliaj evidentigas; ni ĉe trovas funde en ĉiu koro pli-malpli flamantan fajron, kies langoj estas esprimoj de la sento, ke ni ĉiuj estas fratoj en la granda familio de la homaro. Elirante el la sento de la komune homa ni kunagadu por utili



La Reĝa Palaco  
en kiu okazas la poŝtkongreso.

al ĉiuj, al neniu malutilante. Necese estas, mortigi per faktoj teoriojn erarajn, necese estas, aperigi sur unu kampo post alia promesantaj rikoltojn de komunaj klopodoj. La homaro devas, konstruante sian papalacojn, komenci per la pli modesta fundamento, antaŭ ol prepari sin por starigi la majestatan turpinton. Tiam fundamentan laboron plenumis la Universala Poŝta Unio. Sen-nombraj estas certe la ankradoj ideaj kaj materialaj, kiujn la Unio okazigis inter la nacioj kaj iliaj anoj.

Kiam je la 1-a horo post noktmezo la gastoj returnis al siaj hoteloj, ili vidis kun admiro, ke la somera nokto estas luma preskaŭ kiel la tago, kaj la stratanteroj nebezona.

Sabate (la 5-an) je la posttagmezo post turista rondvojaĝo tra la ĉefurbo per aŭtomobiloj, la kongresanoj — kies nombro estas 182 rajtigitoj el 74 landoj krom helpantoj — estis invititaj por teo en la interparolejo de la parlamenta domo. Tie la ministro de komunikaj aferoj senuvaligis portreton de la ĉefo de la sveda poŝto, ĝeneraldirektoro J. Juhlin, faritan de konata artisto ekskluzive el svedaj poŝtmarkoj uzitaj.

La verkisto de ĉi tiu artikolo en tiu okazo renkonfis esperantistojn inter la kongresantoj, nome s-on Narita, japano, konata de nia Kvara en Helsingfors. Ni interparolis kiel malnovaj amikoj; nia ĝojo estis reciproka. Eble ankaŭ aliaj esperantistoj ĉeestas la poŝtkongreson, sed ili ne anoncis sin ankoraŭ. Nu, la kongreso daŭros 50 tagojn, estos tempo. Oni traktos 1400 temojn, eble pli.

Oni aperigis specialajn poŝtmarkojn. (Sed mi ne peras ilin!)

Kvankam la franca estas la oficiala lingvo de la kongreso, ne ĉiuj anoj ĝin scias paroli, eĉ se ili komprenas ĝin. La plejmulto konas nur kelkajn frazojn, la lingvoj baras senĝenan rilaton al la aliaj. Ne sufiĉas, ke la mastroj estas atfablaj.

Stockholm, la 7 julio 1924.

Paul Nylén.

### Stockholm.

Stockholm (elparolu Stokholm kun la akcento ĉe la unua silabo; el „stock“, lignotrunko, kaj „holme“, insuleto), la ĉefurbo kaj la sidejo de la centra administrado de Svedujo, estas lokita ĉe la orienta ekstremo de lago Mälär, kie ĝi enfluas en brakon de Balika maro. La loĝantaro, kiu estis en la jaro 1570 nur 7000, en 1840 iom pli ol 84000, nun estas 425000.

La situacio de Stockholm estas eksterordinare bela. Unu fremda verkinto iam priskribis, kiamaniere la Ĉiopovulo, ŝajnas, elektinte eltranĉojn el skota laga pejzaĝo, porcion el la marbordo de Napoli, kelkajn insulojn de Hyères, iom da granitaj montsuproj el la montaro de Uralo, kaj bone kunskuiginte tiujn ingrediencojn en granda kaldronego, elverŝis la miksaĵon sur la bordoj de golfo de Balika maro, kie ili formas la ĉefurbon de la reĝlando Svedujo kaj portas la nomon Stockholm.

Konstruite grandparte sur insuloj kaj duoninsuloj, Stockholm havas abundan provizon da akvojoj preskaŭ en ĉiuj direktoj, kaj ili formas ĉefan trajton en la ĉarmo de la urbo. Laŭlonge de la bordoj de tiuj akvoj riĉa varieco de scenoj renkontas la okulon — kajoj, placoj, majestaj promenejoj, movoplenaj stratoj, belaj parkoj kaj, sur la suda flanko, fieraj krutaĵoj atingantaj altan de 56 metroj.

Multaj legendoj rakontas pri la origino de la urbo; certe tamen estas ke tiu marurbo devenas el la mezepoko. En la XII-a jarcento oni konstruis ĉi tie fortikaĵon kontraŭ la rabmilitoj de la estonoj. En tiuj tempoj Sigtuna kaj Upsala estis la ĉefaj urboj de Svedujo. La vera fondinto de Stockholm estis, tion oni povas diri, Birger Jarl (1250-1266), kiu donis al ĝi la urban privilegiojn; lia filo Valdemar faris Stockholmon sia ĉefurbo.

Dum la unuaj jarcentoj de sia ekzistado la urbo ampleksis nur la tri centrajn insulojn, nomatajn nun „La Malnova Urbo“ aŭ „La Urbo interne de la pontoj“. Kun siaj aliaj, antikvecaj kaj masivaj domoj, preskaŭ ĉiuj sen kortspaco, ĝi certe estas unu el la plej dense surkonstruitaj lokoj de la mondo. La bordoj estas havenoj. Antaŭ la Norda ponto (Norrbrö) kaj la placo de Gustav Adolf, la centra punkto de la tuta urbo, staras kun sia kvietita fasado la reĝa palaco (Stortet). La malnova kastelo pereis per fajro, kiam la patro de Karlo XII-a en 1697 ĵus estis mortinta kaj la korpo atendis la enterigon. Nikodemus Tessin tiam desegnis la nunan imponan palacon, konstruitan laŭ itala renesanco-stilo en la jaroj 1697–1760. Apud la ponto sur insuleto en la rivero sin trovas la parlamenta domo (Riksdagshuset) kaj malantaŭ ĝi la regna banko (Riksbanken). Proksime de alia ponto pli okcidente, Vasabron, staras la bela Nobelara domo, flanke de ĝi sur la tria insuleto en lago Mälär la preĝejo Riddarholmkyrkan, uzata nur por la tomboj de reĝoj kaj aliaj glotaj svedoj. Alia preĝejo estas Storkyrkan (grandpreĝejo), en kiu predikas, en la tempo de Gustav Vasa, Olavus Petri, disĉiplo de Martin Luther kaj mem la eklezia reformatoro de Svedujo. La Germana preĝejo en la malnova urbo ankaŭ estas rimarkinda.

Ĉe la longaj, rektaj stratoj de la nordurbo (Norrmalm) puzsadas eble plej vigle la komerca



vivo. Tie troviĝas la Akademio de Belartoj, la Reĝa Opera Teatro. La Gimnastika Centra Instituto, fondita de P. H. Ling, „la patro de la sveda gimnastiko“, ĉiam allogis fremdajn interesatojn. La Nobel-instituto kaj ĝia biblioteko altiros al si ĉiujare je la 10 decembro la atenton de scienculoj kaj literaturistoj, kiam la premioj de literaturo, de medicino, de hemio kaj de fiziko estas disdonataj al induloj el la tuta mondo. Sur monteto longe norde staras la Stockholma Observatorio. Ankaŭ la juna Universitato. Malnova estas Porcelana fabrikejo Rörstrand (alia: Gustavsberg sin trovas en la ĉirkaŭaĵoj de la urbo voje al la maro).

Inter la Norda parto kaj la Orienta (Östermalm) mankas la natura limo de akvo. La laste nomita kvartalo kun siaj aleaj bulvaroj kaj verdantaj parkoj, siaj multaj ĝardenoj estas la plej moderna kaj la plej trankvila. La regna biblioteko kuŝas meze de parko portanta la nomon kaj la memorstatuon de la granda Linné. Apud golfo Nydreviken brilas la Drama Teatro, inter kies plej popularaj aktoroj troviĝas Ivan Hedqvist, kiu riskis prezenti teatraĵojn de Strindberg al la Kvara Kongreso en Dresden. Ekster la rando de Östermalm unupartite estas kazernoj por regimontoj, aliparte grandaj malsanulejoj kaj pli malproksime urbeto scienclara, kie loĝas la Scienca Akademio, Tehnika Altlernejo, Veterinara Instituto ktp.

La insulo Kungsholmen, okcidente de la centro, enhavas diversajn urbajn administrejojn, interalie la centra policoj kaj la juĝejo. La plej interesa tamen estas la Urbdomo (Stadshuset) sur la bordo de Mälaren plej proksime al la centro mem. Krom la reĝa palaco la urbdomo estas la plej impona kaj vidinda domo de Stockholmo. Tiu artaĵo projektis arkitekturo Ragnar Östberg kaj gvidis ĝian kreadon, kiu gajnis al li grandan gloron. Per la materialoj kaj per la diversaj detaloj li tute satisfaris la domon je stockholmaj tradicioj kaj memoraroj. La stockholma urbdomo ĝuas jam la famon de eŭropa vidindaĵo.

La panoramo, kiu perspektiviĝas de sur la montaro de la sudurbo (Söder) super la aliajn urbajn regionojn, vere ĉarmas la vidanfon. Aŭ en bela, hela tago somera, kiam la sunradioj briligas la akvojn, sur kiuj kuradas laŭ ĉiuj direktoj vaporŝipetoj kaj grandaj ŝipoj, dum tra la stratoj rapidas la tramvagonoj kvazaŭ ludiloj. Aŭ en vintra vespero, kiam miloj da lumoj laŭlonge de la stratoj donas iluzion de rubandoj el brilantaj sur la blanka proneĝo pejzaĝo.

La akvo fluanta el lago Mälaren sub Norrbrö farigas la Rivero (Strömmen), kiu rapide kaj majeste kuradas al la maro preter la insuletoj Skeppsholmen kun Kastellholmen, kie loĝas la Militŝiparaj institucioj kaj pluen laŭ la bordo de la parka insulo Kungliga Djurgården (la „Reĝa bestĝardeno“). Tie siu trovas la Norda Muzeo kun sia subĉiela sekcio, nomata Skansen (la remparo), kie la nuna kaj pasinta vivado en Svedujo estas ilustrata per originaloj; oni povas do rigardi ĉiujn bestojn kaj birdojn de la lando, eĉ laplandan familion en sia siranga konusa kabano, aliajn specimenojn de domoj karakterizaj por diversaj provincoj, ankaŭ kostumojn, ilarojn kaj meblojn de la popolo, ktp.


Stockholm ne estas nur bela urbo, ĝia situacio ankaŭ estas ĉiel sana. La klimato, entute kontinenta, tamen ne montras malagrablajn irajojn. La frosto de vintro malseveriga per la sudaj ĝis okcidentaj ventoj superregantaj en ĉiu sezono; per la grandaj akvomasoj ĉirkaŭantaj moderiĝas ankaŭ la somera varmo. La printempoj estas longaj, malvarmaj, sekaj, ŝanĝemaj; ankoraŭ pli longaj estas la aŭtunoj, kies temperaturaj rilatoj ne estas malfavoraj. La meztemperaturo montriĝas, laŭ 150-jaraj observoj, +5,8° C, kaj por januaro -3,9° kaj por julio +17,2°; la plej malalta temperaturo observata estas -32,0° (20 jan. 1814) kaj la plej alta +36,0° (3 julio 1811).

Stockholm en ĉiuj rilatoj estas la unua kaj gvidanta urbo de la lando, nur pri marveturado Göteborg ĝin superas. Ne nur ĉiuj komercisto havas telefonon, sed ankaŭ la plejmulto de la familioj. Abono kostas kvaronjare laŭ la plej malkara takso po 25 kronoj.

De la komenco de junio ĝis la fino de aŭgusto ĉiuj instruadaj institucioj ĝuas feriojn, tiam ĉiuj homoj, kiuj nur havas okazon, forlasas la urbon por loĝi en dometo ĉe la maro aŭ aliloke en la kamparo. Tiam ankaŭ ferias la sufiĉe multaj teatroj, nur funkcias kelkaj el la multaj kinematografaj teatroj. Se oni volas serĉi la ombron en verma somera tago, oni tramigras la salonojn de Nationalmuseum (nacia muzeo), kiu enhavas multe da artaĵoj, ne sole pentraĵoj, sed ankaŭ skulptaĵoj, keramiko kaj trovaĵoj historiaj.

Tagmeze oni restas apud la reĝa palaco, kien marŝas la parado de la gardostarantoj kun muziko, senkosta plezurajo por la urbanoj.

„Huddinge.“




Stockholm. — Babela turo.

## Sveda Esperanto-Federacio.

|| Ankaŭ la svedaj esperantistoj vivas, ili laboras, sed ne laŭte. En la pentekosto pasinta la Sveda Esperanto-Federacio havis en Stockholm sian ĵarkunveno. En la sabato vespero la partoprenantoj kolektiĝis en hotelo „Kronprinsen“ je la 6-a. En la duobla eco de honora prezidanto de S.E.F. kaj prezidanto de la Stockholma grupo s-o Paul Nylén malfermis la kunveno, parolante pri „Nia laboro“: ke ni laboru (Esperanto al tio estas inda), kiel ni laboru (ni faru fidele la malgrandajojn!). Aprobinte la tagordon oni elektis prezidantoj de la kunveno s-ojn G. Hedström el Gevle kaj Nylén, sekretario s-on W. Halldor Reprezentantoj de grupoj salutarolis, forestantoj salutis telegrafe. Post manĝo oni ĝuis bonan muzikon kaj kantojn. D-o Sam Jansson, licea direktoro, transdonis kun ĉarma parolo al tri blindaj samideanoj artajn diplomojn de supera ekzameno. S-o Ernst Eriksson, fervojisto, parlamentiano, rakontis pri sia propagando interesajn detalojn. — Ĉiuj diris: nia plej agrabla festo!

La tuta pentekoston tagon en la liceo „Beskowska skolan“ oni laborkunsidis, kun paŭzo nur por tagmanĝo. El la raporto de la estraro



Panoramo de Stockholm el suda montaro.

oni scias, ke la ĵaro estis malpli bona, tamen ne estas kaŭzo por pesimismo. Precipe la laborista societo de s-o Adamson malpligrigis la nombron de membroj kaj pro tio la espezojn. Oni diskutis kion fari por, kiel plej eble, kunigi la fortojn. Interesa raporto de la ekzamena komitato montris, ke la ekzamena demando nun estas solvita, dank' al la lasta helpo de pedagogo D-o Sam Jansson. Oni ankaŭ diskutis pri la sveda gazeto, pri K.R., pri propagandaj kaj administraj aferoj, kaj plenumis elektojn — ĉion en bona konsento. Konkluda priĵo pri la kunsido: malgranda, sed bona!

En la pentekosta lundo la Eldona Societo Esperanto kunsidis. — Vespere aro da esperantistoj faris ŝipe ekskurson al urbo Vaxholm.

Skribisto.

## Kongreso de Pola Esperanto Asocio Warszawa, 6—8 septembro 1924.

La Organiza Komitato de la Kongreso de Pola E.A. havas la honoron informi la interesatojn, ke pro la prokrasto de la kongreso ĝis la 6—8 septembro, la limdato por sendo de aliĝoj al la kongreso kaj de manuskriptoj por la konkurso estas nun la 15 aŭgusto.

Pro organiza kaj loĝeja demandoj, estas nepre necese ke la O.K. sciu, kiel eble plej frue, la nombron de partoprenantoj, kaj ĝi esperas ke la gesamideanoj bonvolos tion kompreni kaj faciligi al ĝi la taskon.

Konsiderante la gravajn demandojn, kiuj estas enskribitaj sur la tagordo, kaj la laborojn entreprenotajn dum la kongreso, la O.K. sendas ree al ĉiuj gesamideanoj interesigantajn pri nia movado plej koran inviton.

Por ĉiuj plujaj detaloj vidu „Pola Esperantisto“, decembro 1922 kaj la sekvantajn numerojn.

La Organiza Komitato.

### Eltirajo el la dua komunikilo.

Aliĝoj. Ni insiste petas ĉiujn samideanojn, kiuj intencas partopreni la Kongreson, ke ili aliĝu kiel eble plej baldaŭ. Jam antaŭ somero la

Komitato nepre devas scii, kiel multnombra estos la Kongreso. Sen tio neeble estas elekti konvenan kongresejon, rezervi sufiĉan nombron da loĝejoj por kongresanoj kaj bone prizorgi ĉiujn aliajn entreprenojn. Ni ankaŭ bezonas monon por la preparaj laboroj kaj tial ni baldaŭ devos aliĝigi la kotizajojn, kiuj tamen ĝis 15 junio restas la samaj:

1. Kongresanoj subtenantoj 3 orfrankoj
2. ordinarnaj 1 1/2 „
3. Lernanta junularo 1 „

Apartaj kvitancoj por ricevitaj kotizajoj ne estos sendataj. Ilin anstataŭos kongreskartoj, kiuj jam estas presataj kaj kiujn ni dissendos baldaŭ al ĉiuj aliĝintoj.

Aliĝilojn ni dissendas kun „Pola Esperantisto“. Kiu ne havas ilin, skribu sur karteto sian nomon kaj adreson kaj kun la kotizo sendu al la Komitato Pridiskutojaj problemoj. Laŭ laborprogramo, publikita en nia unua komunikilo, vidas, ke la ĉefaj demandoj, pri kiuj okupiĝos la Kongreso, estas jenaj:

1. Rilato de la Pola Socio al Esperanto.
2. Organizo de Pollanda Esperantista Movado.
3. Interna vivo de Pola Esperanto Asocio.

La Komitato volonte akceptas kaj konsideras ĉiujn proponojn kaj projektojn pri la supre menciitaj temoj. Ankaŭ liberaj proponoj al la Kongreso estas alataj.

Ĉiuj proponoj devas esti sendataj al la Komitato ĝis 1 aŭgusto 1924.

Konkursoj. Okazas kvar konkursoj, ĉiuj pri temoj mallongaj, kaj nome:

1. Aforismoj pri Esperanto.
2. Poezio ĝis 50 versoj.
3. Noveleto ĝis 5000 vortoj.
4. Pola artikolo propaganda pri Esperanto (2 kolonoj en ĉiutaga gazeto).

Templimo: 1 aŭgusto 1924. La nomo de konkursanto devas troviĝi en aparta fermita koverteto, signita per devizo.

Juĝantaro konsistos el konataj polaj verkistoj esperantaj. Ilia nomaron ni publikigos poste.

La premiiataj verkoj estos presataj en „Pola Esperantisto“ kun konforma mencio.

Ekzamenoj. Sub prezidanteco de D-ro Leono Zamenhof okazos ekzamenoj: lerteca kaj insruista. Ekzamenantoj estos profesiaj pedagogoj, diplomitaj instruistoj de Esperanto. Pri detaloj kaj kostoj vidu nian unuan komunikilon.

La kandidatoj por ekzameno ne prokrastu en skribigon! Post 15 junio la ekzamenkostoj estos verŝajne alifigataj.

Amuzoj. La amuzsekcio publikigos detalan programon en nia sekvanta komunikilo.

Fakaj kunsidoj. Ni forgesu mencii sur la aliĝilo, kian fakan kunsidon vi dezirus partopreni. La Komitato prizorgos la efektivigon de ĉiuj fakaj kunsido, por kiuj anonciĝos ne malpli ol 10 personoj.

Adreso. Adreso por ĉiuj sendaĵoj estas: Pola Esperanto Kongreso, Królewska 19, Warszawa.

Samideanoj! La sukceso de nia Kongreso dependas de ĉiu inter vi. Precipe en nia lando kie oni tiel malmulte aŭdas pri Esperanto, neceso estas grandaj kaj multnombraj publikaj manĝofestacioj.

Tial ĉiu aliĝu senhezite. Aliĝu tuj!

## XI-a Bulgara Esperanto-Kongreso

okazos la 27—29 julio en Rusĉuk kun la jena programo.

Sabato 26 julio. Alveno de la kongresanoj. Vespere manifestacio kun muziko de la stacidomo ĝis la urba kazino. En la sama interkonatiĝo vespero.

Dimanĉo 27 julio. Malfermo de la kongreso en la „Moderna Teatro“. Posttagmeze vizitado de la urbo. Amuzvespero en la centra urba ĝardeno.

Lundo 28 julio. Laborkunsido. Fakaj kunsidoj. Posttagmeze komuna boatpromonado sur la Danubo. Vespere kinematografita teatro.

Mardo 29 julio. Laborkunsido. Fakaj kunsidoj. Fermo de la kongreso. Vespere koncerto en la urba teatro.

Merckredo 30 julio. Forveturo de la kongresanoj.

Post la kongreso okazos karavana vojaĝo al IX-a Rumana Kongreso en Arad kaj Deksesa en Wien laŭ la jena plano:

Forveturo de Rusĉuk la 30 julio tagmeze. Alveno en Bukureŝti dum la vespero. Restado ĝis tagmeze la 1 aŭgusto. La kongresanoj disponos 36 horojn por trarigardo de la urbo. La 1 aŭgusto tagmeze kun la rapida vagonaro daŭrigas la vojaĝon al Arad kie ili alvenas frumatene la 2 aŭgusto. La 3 kaj 4 aŭgusto restado en Arad. La 5 aŭgusto je la 6 mateno forveturo de Arad. Tagmeze la kongresanoj



alvenas en Budapeŝto, kie ili restas ĝis meznokto por rigardi la urbon. La kongresanoj alvenas en Vien la 6-a aŭgusto matene.

Sekretario de la L. K. K.:  
Vi. Georgiev.

## IV-a Rumana Esperanto-Kongreso Arad, 2-5 aŭgusto 1924.

Programo provizora.

Sabato, la 3-a aŭgusto.

Dum la tago: Akcepto de la alvenantaj kongresanoj. Vespere: Interkonatiĝo en la pavilono.

Dimanĉo, la 3-a aŭgusto.

Je la 9-a horo: Diservo kun Esp.-lingva prediko.  
Je la 10-a horo: Solena malfermo de la kongreso.  
Je la 13-a horo: Tagmanĝo (laŭvola).  
Je la 16-a horo: Vizito de la rigardindaĵoj de Arad.  
Je la 21-a horo: Koncerto.

Lundo, la 4-a aŭgusto.

Je la 9-a horo: Laborkunsido.  
Je la 13-a horo: Tagmanĝo (laŭvola).  
Je la 16-a horo: Laborkunsido.  
Je la 20-a horo: Vespermanĝo je la honoro de forveturontoj al Vien.

Mardo, la 4-a aŭgusto.

Je la 7 h. 15 min.: Karavana forveturo al Vien.  
Je la 7 h. 45 min.: Ekspedvojaĝo al Radna kaj al la fortikajruinoj de Shojmsh. En la korto de la fortikaĵo estas amuzado.

Vespere: Reveturo.

Kongreskarto kostas 100 leojn, por familianoj kaj studentoj 60 leojn, kaj ĝi rajtigas: 1. ricevi la kongresan insignon kaj detalan programon; 2. partopreni la kunsidojn; 3. ricevi fervojan rabaton; 4. ricevi kongresan loĝejon, ktp. Eksterlandanoj povas pagi la kotizon je la alveno.

Fervoja rabato de 75% sur la rumana ŝtata fervojaro por al- kaj reveturo. Kiel legitimilo servos la kongresa karto.

Adreso: Esperanto-Kongreso, Arad.

## La surdmutoj kaj Esperanto.

Menciante la temon „Surdmuto kaj lingvo“, oni ofte renkontas tute strangan opinionon. Ekzistas ne mal multe da homoj, kiuj kredas, ke la surdmuto rilatas al la lingvo same kiel la besto. Ili ne scietas, ke la surdmutoj de la nuntempo havas lernejojn kiel la ceteraj homoj, en kiuj ili lernas la saman, kiel aliaj homoj, nur kelkfoje iom alimaniere. Kompreneble, la surdmuto ne kaptas ĉion samrapide per la intelekto kiel homoj kun kvin sensoj perfektaj. Sed tio ne malhelpas, ke ekzistas eĉ tre inteligentaj homoj inter la surdmutoj kaj ke la plej multaj surdmutoj estas kapablaj por lerni ankaŭ fremdan lingvon. Ĉar la surdmuto havas en sia gesta lingvo lingvon internacian, li malpli multe bezonas lerni fremdan lingvon por la buŝa interrilato — parto de la surdmutoj povas eĉ paroli kaj aŭdi (t. e. vid-kompreni per la okuloj, kion iu parolas) pli aŭ malpli bone — ol por la lerta. Mi jam diras, ke la surdmuto kompreneble bezonas pli multe peni, lernante ion, ol alia homo. Tial li devas esti eĉ pli ŝparema rilate tempon kaj pli bonmastruma rilate spiritan forton ol iu alia. Tio estas, se oni parolas pri fremda lingvo, ke li devas elekti tiun lingvon, kiu estas plej rapide lernebla kaj per kiu li povas interrilati kun kiel eble plej multaj homoj. Ni ne dubas, ke tiu ĉi lingvo estas nur Esperanto, kiu estas ankaŭ facile elparolebla por tiuj surdmutoj, kiuj povas uzi siajn parolorganojn.

Pripensinte tion, en la antaŭa jaro la Internacia Egaleca Surdmutila Konsilantaro „Liebe und Hilfe“ (Amo kaj Helpo) en Bonn rekomendis Esperanton kiel surdmutilan lingvon internacian. La instigilo al tio donis s-ano D-o Rung (Koblenz), ne sciante pri tiurilataj proponoj faritaj jam antaŭ la milito. Troviĝis baldaŭ du aretoj da surdmutoj, kiuj komencis lerni Esperanton, en Bonn sub la gvidado de s-ano Taubmann kaj en Koblenz sub la gvidado de s-ano Siroh. Je pentokosto dum regiona kongreso de la surdmutoj en Koblenz oni havis okazon konvinkigi per deklamoj kaj skribaj provoj sur murtabulo, ke la studado jam havas bonan sukceson. La kongreso, kiun ĉeestis i. a. aŭdantaj gastoj ankaŭ reprezentantoj de la Rejnland-komisiono (H. C. I. T. R.), staris tute sub la signo de Esperanto. Krom la cititaj prezentadoj de s-joj Hack kaj Dumm s-ano Funken havis paroladon en Esperanto pri la supra temo, interpretatan de D-o Rung samtempe en la germanan kaj gestan lingvojn. Per propagandiloj oni varbis por Esperanto Kelkaj neesperantaj prezentantoj bone sukcesis.

Entute el tio oni povas konkludi, ke ankaŭ la surdmutoj estas kulturportantoj kaj eĉ pioniroj de la progreso, ke ankaŭ ili ŝatas la sciencojn kaj klopodas al altaj celoj. Tion mi kaj ĉiuj ĉeestantoj kun ĝojo konstatis, kaj volonte ni rakontos al aliaj pri la fervoro, kiu regas inter la surd-

mutuloj. Supozeble ankaŭ la XVI-a okupiĝos pri la problemoj „Surdmutoj kaj Esperanto“.

Leono Funken.

## Internacia Esperanto-Instituto.

Dum la konferenco de C. K. kaj K. R. en Genève, je pasko 1924, oni decidis, restarigi sur nova bazo „Internacia Instituton“, kiu iam ekzistis, sed ne plu funkciis dum la lastaj jaroj, ĉar intertempe naciaj Esperanto-Institutoj fondiĝis, kiuj pli bone povis zorgi pri aferoj, kiuj antaŭe apartenis al la taskoj de la iama Internacia Instituto.

Sed, ĉar tiaj naciaj institutoj ne ekzistas en ĉiuj nacioj kaj kelkaj de la seninstiuitaj nacioj petis, zorgi denove pri ekzamenoj antaŭ internacia institucio, ni ankaŭ denove devas funkciigi institucion por ekzamenoj antaŭ aŭ postkongresaj en la koncerna kongresurbo. Krom tio, ankaŭ pli ol en pasinta tempo, estas necese, kunligi kun niaj internaciaj kongresoj kelktagajn kursojn, en kiuj oni aranĝas prelegojn pri nia historio, nia literaturo, pri pligrava demandoj rilate la evoluadon de nia lingvo, pri organizado kaj organizado, pri la gazetaro ktp. ktp., kaj en kiuj oni povas aŭdi en rondo malgranda niajn plej lertajn samideanojn kaj plej bonajn paroladistojn.

Pri ĉi tiuj aferoj zorgu la Internacia Instituto, kiu estas fondota laŭ la decido en Genève sur la bazo de porlabora unuigo de la naciaj Esperanto-Institutoj kaj naciaj ekzamenkomisionoj.

Cetero ĝi farigiu institucio, kiu kunligos la naciajn institutojn por regulaj kaj pli firmaj interrilatoj, kaj, se estas necese, por komuna propagando antaŭ registaroj kaj gravaj institucioj sciencaj, kulturaj, teknikaj, komercaj ktp.

Bona aranĝo de la laborprogramo por la nova instituto postulos tre detalan diskuton pri la financa bazo, pri statutoj, pri elekto de ekzamenkomisaroj, kurslektoroj, komuna agado. La nova institucio nur iam povos funkcii kontentige, se ĉiuj demandoj estos pritraktataj sufiĉe diligente kaj singardeme kaj iamaniere, ke ĉiuj naciaj institutoj kaj komisionoj povos tute konsenti la laborprogramon.

Do, komisiite en Genève fari la antaŭlaborojn por la nova Internacia Esperanto-Instituto, mi petas ĉiujn reprezentantojn de la diversaj naciaj institutoj kaj de la naciaj ekzamenkomisionoj, partopreni konferencojn en Vien. La Wien-a L. K. K. jam skribis al mi, ke ĝi zorgos, anonci ĉi tiun konferencojn en la listo de la dumkongresaj fak-kunsidoj, kaj ke ĝi disponos ĉambron.

Mi petas ĉiujn, kiuj povos helpi la starigon de la Internacia Instituto, ke ili nepre partoprenu la kunvenon, eble eĉ rezignant al alia grava fak-kunsido.

D-o Dietterle

ano de la Centra Komitato.

## Al Wien.

### Speciala vagonaro Praha-Wien.

Ĉeĥoslovaka vojeĝ- kaj transportoficejo „Ĉedok“ aranĝos okaze de la XVI. Universala Esperanto-Kongreso en Wien specialan vagonaron Praha-Wien, forveturontan la 6. VIII. ĉirkaŭ la 9 matene.

Aligoj al ĉi tiu vagonaro estas fareblaj plej malfrue ĝis la 1-a aŭgusto 1924 samtempe kun la rebatita veturpago: Kč. 59.— en la III. klaso anstataŭ Kč. 75.—

La veturprezon pagi en via valuto en rekomendita letero laŭ jena tabelo:

ormarkoj III. kl.	7.50	II. kl.	14.90
nederl. guld. III. "	4.95	II. "	9.90
danaĵ kronoj III. "	11.25	II. "	22.70
norvegaj kronoj III. "	13.40	II. "	26.50
svedaj kronoj III. "	6.65	II. "	13.50

Se pro manko de aligoj la fero ne sukcesos, la pago por la veturo estos plensume redonata: Estas do en intereso de la esperantistaro, ke ĝi per rapida aligo ebligu la aranĝon de la speciala vagonaro Praha-Wien.

Per decido de la 15 junio 1924 n-o 93955/24-V. insp. disponigis ĉs. ministerio por eksteraj aferoj al la kongresanoj 50% rabaton je simpla traveturvizo, valora ankaŭ por la restado en ĈSR kaj reveno.

„Ĉedok“ estas preta logiĝi en Praha la partoprenantojn de la ĉiita vagonaro, tial oni estas petata ĝis la 25 julio sendi la mendon, enhavantan nombron de ĉambroj kaj litoj kun 30 Kč por persono kiel antaŭpago por la logiĝo. Al la rezigninto je logiĝo Ĉedok redonos 50% de la pagita loĝeja prezo.

Ĉiujn mendojn sendu tuj al Ĉeĥoslovakska cestovni a dopravní kancelář en Praha II, Mikulandská 7. (Esperanto korespondata)

Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto  
Pitlik, prez.

### Karavano de Strasburgo al Wien kaj de Wien al Lyon, la 8 julio 1924.

(1-a cirk.)

Sekve de pluraj diversaj petoj mi hodiaŭ ekklopodos rapide organizi Karavano de Strasburgo al Wien kaj de Wien al Lyon, por kiu mi esperas ricevi la oficialajn aŭspiciojn de UEA.,

se ne jam estas organizita alia Karavano de UEA. Iro kaj reveno estos aranĝataj aparte.

Ĉar la nacia Kongreso de S. F. P. E. okazos en Strasbourg la 2 kaj 3-a aŭgusto, kaj ĉar la Universala Kongreso de Esperanto en Wien komenciĝos la 7-a aŭgusto, ni forveturos el Strasbourg lundon 4-a aŭgusto je la 5 h. tra Basel, Zürich, Innsbruck, Salzburg, Linz, kaj alvenos en Wien merkredon 6-a aŭgusto je la 18 h. (longa ripoziga halto en Salzburg, suprenveturo per dentradvagono al Gaisberg je 1286 m., ŝipveturo sur Danubo de Linz al Wien).

Vi povos kunigi kun la Karavano la 4-a aŭgusto en Strasbourg (4 h. 45), en Mulhouse (5 h. 30), en Basel (7 h. 20), aŭ en Zürich (9 h.).

La reveno okazos ĉu tra Salzkammergut, Tirolo kaj Svislando, ĉu tra Semmering, Dolomitoj Alpoj kaj Italio, kaj ne estos tiel rapida kiel la iro.

Necesas, ke vi tuj klopuu por ricevi pasporton kun aŭstria vizo (duona prezo kun kongreskarto); la svisa vizo ne estas bezonata; la itala vizo povus esti petata en Wien.

Kondiĉoj: 1<sup>o</sup> havi pasporton kaj ne iro pezajn pakojn;

2<sup>o</sup> esti almenaŭ Membro-Abonanto de UEA.

jam de 1923 aŭ nun aliĝi kiel Membro-

Subtenanto (samfamiliano povas esti nur simplaj Membroj sed jam de 1923);

3<sup>o</sup> aliĝi al la 16-a Universala Kongreso de Esperanto;

4<sup>o</sup> tuj skribi al mi, se vi deziras ricevi detalan programon kun proksimumaj prezoj, kiu aperos antaŭ la 20 julio;

definitivaj aliĝoj ne povos esti akceptataj post la 25 julio;

5<sup>o</sup> akcepti la programon kaj kunan regularon.

Mi bone konas ĉiujn vojojn al kaj el Wien kaj mi plurfoje vizitis la aŭstrian ĉefurbon; sperte mi povas certigi, ke tiu vojaĝo estas belega; mi esperas, ke tiu Karavano kontentigos ĉiujn, kaj mi penos por tio.

L. Poncet,

Vic-Ĉefdelegito de U. E. A.

por Sud-Orienta Franclando,

30 rue Ferrandière,

Lyon.

(Poŝtaj ĉekoj: 5467—Lyon;

Société Générale: 102, 145—Lyon).

Bedaŭrinde la cirkulero atingis nin, kiam la antaŭa numero de ET jus estis presata.

## La XVI-a. Gravaj informoj por kongresanoj.

Fervoja rabato 33% aŭ 50% en Ĉeĥoslovakio. — Urbo Praha disponigas tramon por rondvojaĝo de esp. karavano tra Praha.

(Oficiala komunikilo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esp.)  
Aliaj gazetoj bonvole represu.

### 1. Pasportiva rabato.

Ĉiu kongresano prezentanta ĉe la ĉeĥoslovaka konsulejo la kongresan karton ricevos 50% rabaton je vizokosto (traveturo aŭ restado).

### 2. Fervoja rabato.

Laŭ la peto de Ĉs. Asocio Esp., la ministerio de fervojoj koncedas per sia dekreto de 5 julio n-o 40509-III/5 jenajn rabatojn sur ĉiuj fervojoj ĉeĥoslovakaj en iu ajn klaso de ordinara aŭ rapida vagonaro, validajn inter la 4-25 aŭgusto inkl.

a) Ĉs. kongresanoj ricevos 33% rabaton, se ili prezentos ĉe la stacidoma kaso siajn kongresan karton kaj pasporton. Estas necese aĉeti bileton ĝis aŭstria limstacio, sed oni povas unufoje interrompi la veturon. La interrompon anoncu en la stacia oficejo. Rabato validas ankaŭ por la reveno.

b) Eksterlandaj kongresanoj traveturantaj Ĉeĥoslovakion ricevos ankaŭ 33% rabaton. Necesas prezenti en la enira limstacio la kongresan karton kun pasporto kaj aĉeti tie bileton ĝis elira limstacio. Validas ankaŭ por revena traveturo. Interrompo ebla kiel sub a).

c) Al grupoj de eksterlandaj kongresanoj, kiuj inter la 4-25 aŭgusto volas viziti Ĉeĥoslovakion (grotinoj de Macocha, montaron Tatraj, banlokojn Luhačovice, Poděbrady, Karlovy Vary, Františkovy Lázně, Mariánské Lázně, banlokojn en Slovakio aŭ iun ajn alian lokon) estas donita por la tuta vojo, kiun ili elektos, rabato 50% kiu ricevos ankaŭ ĉeĥoslovaka samideano ilin akompananta. Necesas anonci tian al Ĉs. Asocio Esp. (Praha-VII, Sochařská, 353) aŭ en Wien al s-joj Ginz aŭ Hromada (kongresa oficejo) kiuj havigos la komunan rabatilan karton gvidanton. Tiu gvidanton devas havi skriban dokumenton donitan de Ĉs. Asocio Esp. pri tio, ke li estas komisiita esti gvidanto.

### 1. Karavano Berlin-Praha-Wien.

Specialajn aranĝojn ni preparis por kongresanoj el norda Eŭropo, kiuj aliĝos al karavano de s-o. M. Blankenheim, ĉefdele. de UEA, Berlin-Steglitz, Stubenrauchplatz 5, forveturonta mardo la 5-a aŭgusto matene el Berlin kaj alvenonta al Praha posttagmeze je la 16 horo (stacidomo Wilson).

Fervoja rabato. 50% se la biletoj estos aĉetataj en ĉeĥa limstacio Děčín Podmokly (Tetschen-Bodenbach) ĝis la aŭstria limstacio Gschk Velenice (Gmünd) kaj se la veturo estos interrompata en Praha, laŭ la programo. Validas ankaŭ por reveturo, nature sen plua interrompo en Praha. Sparo dum ebla veturo ĉ. 80 Kč (12 sv. fk., 10 ormk., t. e. kosto de unutaga bona restado en Praha kun loĝo kaj manĝo). La komunan rabatilan reprezentanto de CAE transdonos en la limstacio al la vagonano. — Ĉer en sia 2. komunikilo s-o Blankenheim rekomendas aĉeti bileton ĉe iu vojaĝa oficejo en Berlin, ni atentigas, ke tiu ĉi 50% rabato estas ebla sole, se oni aĉetos bileton nur en la limstacio ĉeĥa. Aĉetu do bileton sole ĝis Děčín-Podmokly, la ceteron ni prizorgos.

En Praha speciala, granda tramvagono senpage disponigita al CAE de la Urba Elektra Entreprizoj transportos la karavano al ĝia hotelo. Por ebligi al gastoj vidi oportune en 2-3 horoj la tutan urbon, tiu ĉi vagono



poste veturos kun ili de la hotelo tra la urbo. Klarigado en Esperanto memkompreneble prizorgota de membroj...

Loĝigo. La tuta karavano loĝos en la sama hotelo. Prezoj de ĉambroj: Unulitaj: 1. etago 26 aŭ 28 kĉ, II. et. 22 aŭ 26 kĉ, III. et. 21 aŭ 24 kĉ, IV. et. 16 kĉ...

Estas necese skribi ĝis 1-a aŭgusto al s-o Blankenheim en Berlin aŭ al Ĉsl. Asocio en Praha, kian ĉambrojn kaj por kiu prezo vi deziras.

Forveturo per speciala vagono kune kun ĉs, kongresanoj la 6-a aŭgusto je la 7-a matene. Alveno Wien je la 14.30.

Kontentaj, ke ni povas doni al vi tiujn ĉi informojn, ni ĝojas je la revido, ĉiam pretaj plenumi specialajn dezirojn.

Radio.

(Reprezo en radio-gazetoj nepre rekomendata.) Stuttgart.

Malnova pioniro de nia afero s-o bankisto D-o A. Vogt, vicprezidanto de Germana Esp. Asocio, Stuttgart, faros du radioparoladojn de la 28 kaj 29 julio je la 20-horo. Daŭro po 20 minutoj.

Gazeto, kiu manku en neniu biblioteko esperantista

INFORMOJ de Esperanto-Asocio de Estonio.

Ĉiunonate aperante, regule jam pli ol unu jaron (ilustrita, 8-paĝa), "Informoj" liveras al legantoj...

Unika

pro sia pure esperanta karaktero!

Konstantaj fakoj: El la Estonio Esperanta movado, Kritiko-Bibliografio, Demandoj k. Respondoj, Faktoj por propagando...

Abonkondiĉoj: jare 3.50 sv. fk., duonjare 2.- sv. fk., kvaronjare 1 sv. fk. aŭ la ekvivalentoj per alia mono.

Admin. de Esp.-Asocio de Estonio, Tallinn - postkasto 6.

Jus aperisi

Jus aperisi

Adam Mickiewicz Improvizacio de Konrad

dua eldono en majstra traduko de R. J. Dobrzański deklamota dum la XVI-a Kongreso de Esp. en Wien

Pezo: sv. fk. 0.25

Eldonejo Esperantista Voĉo, Jaslo (Pollando).

„Esperantista Junularo“

Organo de UEA-Junularo — bela por infana literaturo — Internacia lernejo-servo. Abonprezo po numero 1/3 afranko de letero por eksterlando (jare 8 n-oj).


Administracio: A. Neupert, Wedellstr. 17 - Leipzig-Möckern, Germ.

NOV

aĵo tre interesa por filatelistoj estas la poŝtmarkoj eidonitaj kaŭze de la VIII-a Tutmonda Poŝtkongreso en Stockholm 1924.

H. Halldor,

del. de UEA, Fack 698, Stockholm 1.



Pensiono Erika Tschierschen b. Chur, Svislando (1350 m super maro)

Ĉarma loko por libertempuloj, alpa regiono, montekursuloj, bonega kulturaĵo. Prezo de kompleta pensio 8 sv. fk.

Jak. Wiesner.

En presado:

Gvidlibro tra Zürich

20-paĝa, ilustrita, kun urboplano. Rekomendinda por partoprenantoj de la XVI-a.

Prezo nur sv. fk. 0.40 pagebla en svisaj poŝtmarkoj aŭ 1 nova egalvalora respondukupono.

s-ino Sing,

Turnersir. 12 Zürich 6.



LEIPZIG-A FOIRO La ĝenerala internacia foiro de Germanujo

La unua kaj plej granda foiro de la mondo. Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj.

Ĝenerala Specimenfoiro kun foiroj por tekniko kaj konstrufako

Aŭtuna foiro 1924 de la 31-a de aŭgusto ĝis 6-a de septembro.

Printempa foiro 1925 de la 1-a ĝis 7-a de marto.

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la foiroficejo por la specimenfoiroj en Leipzig:

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN IN LEIPZIG

Ĉiu esperantisto, kiu interesigas pri la politikaj problemoj de Eŭropo, devas legi la en julio aperantan libron pri aktuala temo:

La Sendanĝereco de Francujo

(„La Sécurité de la France“)

de s-o André Honnorat, Senatano, eksministro de Publika Instruado en Francujo.

Volumo de ĉirkaŭ 160 paĝoj kun aparta antaŭparolo de la aŭtoro

Kolektiva traduko kontrolita de s-o Grosjean-Maupin.

La prezo de la volumo nur 5 fr. fk. + 0.50 por sendelspezoj.

Ĉefa Deponejo:

Centra Librejo Esperantista, 51, rue de Clichy, Paris 9 e.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskigo, fianĉigo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage.

POŝTMARKOJ KOLONIAJ MALKARAĴ. Paketoj de ĉiuj malsimile: Brit-Kolonioj, 100: 1-50. 200, 5-00. Franc-Kolonioj: 200, 6-00. Ital-Kolonioj: 100, 7-25. Portugal-Kolonioj: 100, 8-00. Aziaj-Amerikaj: 100, 2-00. Irlando, serio kompleta, 1-75. Svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Afranko ekstera. Polleit, 6 Edith Road, London, W. 14. Anglio. [2]

LIGNAJISTO! Oni volas interrilati kun kontinenta fabriko de lignaĵoj kun celo komerci. Ĉiuspecaj tornaĵoj bezonataj, poluritaj kaj ne. Sendu katalogojn kaj prezojn al: Fermo A. Smith kaj Filoj, 79, Listria Park, London N. 16, Anglulo. [2]

KOLETKVENDISTOJ! ATENTU! Germano deziras vendi ĉirkaŭ 1000 konstituciaĵojn 11-a aŭgusto 1919 sume aŭ popeco Prezproponojn al UEA-ano 18882 Friedrich Gerstner, insruisto, Karlsruhe-Rinheim, Hauptstr. 11. Germanlando. [1]

SOMERA RESTADO. — Vidvino de advokato en Budapeŝt (Hungarujo), 36 jara, serĉas inteligentajn kaj bonstatajn familion en eksterlando (kondiĉo: bela ĉirkaŭaĵo) kiu ŝin afable akceptus por 4-6 semajnoj kiel gaston. Ĝi plezure rekomencos ĉu per pago, ĉu per reciproka gastigo dum la vintro en Budapeŝt. Si parolas hungare, france, germane kaj angle. Propozonon sendu urĝe al s-ino Serafino Fodor en Deva (Transilvanio, Rumanujo), str. Principele Carol n-o 50. [1]

SAN SEBASTIAN. Angla samideano intencas libertempe dum 10 tagoj en San Sebastian je la fino de julio, kaj pro tio, ke UEA delegito ne troviĝas, petas ke iu samideano ŝia sendu adreson, al kiu li povus peti kelkajn sciigojn. Ĉiun poŝtelspezon li volonte pagos. H. My. Thomas, 142-a Camberwell Grove, London S. E. 5. Angl. [1]

Korespondado kaj Interŝanĝo.

S-o N. W. Frost, 12 Ash Street Place, Cambridge 38, Mass., Rusujo, deziras aĉeti uzite aŭ nove Lauer; Moise de Khorone kaj kelkajn similan postklasikaĵojn traduktajn en iun alian lingvon modernan pri historio inter 5-a kaj 15 jarcento. Petas ofertojn per poŝtkarto. [2]

24-jara fraŭlo Aleksandro Petroviĉ Novkrestenov, Serdobsko, Saratova gubernio, Jeleznodoroŝina, 51, Ruslando, deziras korespondadi pri metodoj de instruado de Esperanto, pedagogio, populolo, gimnastiko, hipnotismo kaj a. t. Interŝanĝas per fotografiaĵoj. Respondon garantias. [2]

Gesinjoroj liĉio kaj Anjo Kalinin, poŝt. ĵasĉik N. 51, Astrahan, Rusujo, deziras korespondi pri religio k. ĉ., interŝanĝas il. PK. PM. kaj papermonon. [2]

S-o Serdjukov A. J., poŝt. ĵasĉik 51, Astrahan, Rusujo, deziras korespondi pri pentrato Ĉiam respondos. [2]

S-o Wilhelm Cremer, inspektoro, Benrath, Rheinland, Markt-platz 4, Germanujo, deziras interŝanĝi il. PK. kun gesinjoroj ideanoj de la tuta mondo. Tuj respondos. [2]

Fraŭlo Franz Kolar, Steyr, Wiedenfeldpl. 32, Aŭstrujo deziras korespondadi kun tutmondaj samideanoj. Interŝanĝas ankaŭ PM. Ĉiam respondos. [2]

S-o Nelson kaj s-ino Olga Johansson, Strand, Svedujo, deziras korespondi kun popolaj instruistoj, precipe hinoj, japanoj kaj hindoj per il. PK. [2]

Tra la mondo. Esperanta grupo Nieder Salzbrunn deziras korespondadi kun gesperantistoj de la tuta mondo. Ni certe respondos al ĉiu. Bonvolu skribi al s-o Fritz Kinner, Nieder Salzbrunn, Poststr. 5, Schlesien, Germanujo. [2]

S-o Nikolaj Zjubomirov sangis sian adreson. Atentu geesp-istoj, li korespondadas kun tuta mondo pri temo „Kio estas l' amo.“ Adreso: Nikola Zjubomirov, Berkovica, Bulgario. [2]

Mi serĉas diligentajn korespondantojn de la tuta mondo per L kaj PK il. pri diversaj temoj. Mi certe kaj tuj al ĉiu respondos. S-o Rudolf Charbulak, komercisto, Hranice, Moravio, Ĉeĥoslovakio. [2]

S-o Rudolf Prause, Düsseldorf, Rotherbroich 20, Germanujo, deziras interŝanĝi il. PK bil. kun gekamaradoj de la tuta mondo. [1]

Por aranĝi en aŭtuno grandan Esperanto gazet-ekspozicion ni petas la samideanojn ĉiulandajn subteni nin en nia propagando per alsendo de ĉiuj-specaj Esperanto gazetoj al s-o instruisto E. Markau, Potsdam, Hessestr. 5 N kore dankas al ĉiuj sendontoj. [1]

Mi deziras korespondi kun 14-15-jaraj studentinoj de mezlernejoj. F-ino Henriette Werner, Wien XVII, Schulthessgasse 3/19, Aŭstrio. [1]

F-ino Paula Nikitiin, Kalenĉevska pl. 1 j Krasnodudni per dN/2, kv. 7, Moskva, Rusujo, korespondas pri turismo, interŝanĝas fotografiaĵojn, PK il. [1]

Kolegoj geofizikistoj kaj precipe meteorologoj sciigu vian adresojn kaj komuniku pri stato kaj studado de viaj institucioj al kunlaboranto de regna geofizika instituto en Kuĉino, I. Ivanov, Arbat 57, kv. 25, Moskva, Rusujo. [1]

S-o Kurt Bärhel, Buchholz (Sa.), Katharinenstr. 9, III, Germ., deziras korespondi per il. PK kaj L. Precipe Francujo, Sud-kaj Ekstereŭropo. Certaj respondos! [1]

S-o Hinrich Segelken, Embsen 109, Kreis Achim, apud Bremen, Reg. Stade, Prov. Hannover, Germanujo, deziras korespondi per il. PK kaj L. kun la tuta mondo. Kolektas fotografiaĵojn de gesperantistoj, pezaĵaj bildoj. Esperanto-Hejmoj, vidaĵoj de ĉarmaj loĝdometoj, ĝardenloĝdometoj. [1]



## Plena Listaro de niaj literaturaj manuskriptoj.

Fine ni sukcesis starigi listaron de la nepublikigitaj literaturaj manuskriptoj, kiuj alvenis ĉe ni antaŭ la 1 marto 1924 kaj kiuj troviĝas ankoraŭ ĉe ni. La listaro enhavas entute 467 manuskriptojn, el kiuj estas presotaj 141, eventuale presotaj 44, kaj ne presotaj 282. Krom tio ni havas ankoraŭ aron da poemoj de s-o Sian. Braun, registritaj sub n-o 1500, kiuj preskaŭ ĉiuj estas presotaj.

La listaro estas dividita tiamaniere, ke ĝi montras unue la presotajn, poste la eventuale presotajn kaj fine la ne presotajn manuskriptojn. La tri partoj de la listaro estas ordigitaj alfabeto, laŭ la komenclitro de la titoloj. Post ĉiu titolo staras la numero, sub kiu ĝi nun estas registrita ĉe ni. Verkintoj, kies manuskripto ne estas presota kaj kiuj deziras resendon, bonvolu informi nin ĝis 31 oktobro, indikante la registro-numeron kaj aldonante validan respond-kuponon aŭ monbileton sufiĉan por la resendado kaj ankaŭ sian novan precizan adreson. Post 31 oktobro ni bruligos la ĝis tiam ne repostulitajn manuskriptojn nepresotajn.

Liston pri la manuskriptoj ricevitaj depost 1 marto 1924 ni publikigos poste.

Nia decido pri nepublikigo de iu manuskripto ne estas ĉiam kaŭzita de ties netaŭgemo. Ni devis malakcepti kelkajn eĉ tre taŭgajn manuskriptojn, kiuj tamen pro sia enhavo, tendenco aŭ pro alia kaŭzo ne estis konformaj al nia propra tendenco aŭ gusto. Nevolonte ni akceptas ankaŭ tradukojn de tradukoj, aŭ tradukojn el lingvo, kiu ne estas la gepatra lingvo de l' verkinto.

La respondecon pri permeso por traduko kaj publikigo ni devas lasi al la tradukintoj mem.

Koncerne la devenon de la manuskriptoj ni konstatis, ke la plimulto venas el slavaj landoj (Ruslando, Polujo, Jugoslavio), malpli venas el germanaj landoj kaj plej malmulte el romanaj landoj (escepte Rumanujo).

Al ĉiuj niaj literaturaj kunlaborantoj, kies fervoreco montriĝas el la grandega nombro da alsenditaj manuskriptoj, ni esprimas eĉ tie nian koran dankon kaj nian firman esperon, ke la kvalito de niaj literaturaj manuskriptoj, kiuj ja prezentas parton de la tuta esperanta literaturo, konstante pliboniĝu — por la grandiganta reputacio de ET kaj de nia lingvo Esperanto.

Lit. Red. de ET.

### Listo I.

#### Presotaj manuskriptoj.

Adiaŭo 2589, A. F. 2575, Agonio de la „Sémilanie“ 2473 c, Al Eva 2578 b, Al Hanso 2578 d, Al la maro 2595 q, Al memoro de Leibnitz 1017, Al memoro de Zamenhof 2062 a, Al St. Mor. 2578 c, Ama peko 2594 d, Andreĉo 2481, Anima amo 2555, Antaŭen (L. T.) 2610, Arto de antaŭ-historia homo 2802, Aŭtobiografio 4, Aŭtomato 2583 a, Aŭtuno 2593 j, Aŭtuno (Balkanano) 2571 b, Bandi 2517, Bonulo kaj sentaŭgulo 43 c, Bu Adem 2423 b.

Ĉe la tombo de l' patrino 2800, Ĉe l' kameno 2593 c, Disiĝo 2598, Dum nokta trunkvilo 2571 a, Dum tiu nokto! 2593 a, Du riĉuloj 2462 a.

Elegioj (Puŝkin) 2440 a, El „Golestan“ 2563, El la regno de l' reĝo Nuksrompulo 2601, El la vivo (Urstin) 18, El Marya Konopnicka 2577, Eraro (Deŝkin) 2573 a.

Fabelo pri la origino de la puloj 29 a, Fabeloj de Lessing (parie) 2515, Fragmentoj (Dekker) 2485.

Gajec' velkinta 2440 c, Grafo Kalioŝtro 2578 a, Hali', ĉeval'! 2593 b, Ho maro! 2516 b, Homo (P. J.) 2489 a.

„Jes“ kaj „ne“ en la virina vivo 2552 a, Judaj spritaĵoj 2560 a.

Kaŭkazaj rakontoj (Du najbaroj, Sur Kazbeko) 2551 b, Kial? 1 b, Kial la diablo timas feron 6 b, Kial vi ne mensogis? 25, Kial vi plendas? 2574 b, Kiel, kiam, kiom manĝi? 51, Kion sciigis paĉjo 8 a, Kölsche Spien 1008, Kuracilo 2473 a, Kvar tagoj 2541.

La amozulo 2462 b, La animo de l' floroj 2518 b, La „arbo de la vojaĝantoj“ 49 a, La asro 25, La bukedo de S-ta Johano 2518 c, La ĉamaj rodlas 30 a, La dogido de Bob Brierley 2547, La donaco de la linkino 2499, La forgesita kuko 2483 b, La fratino-rabistoj 2593 f, La gobeleno 2599 a, La grizaj tagoj 42, La hundo dum la vintro 2608, La kosto de kolumbonto 2506, La kreo de homoj 5, La legebla surskribo 11, La leono (fablo) 2457, La lito 2501, La mal-feliĉa bulgarino 2487, La malsaĝulo 2462 c, La mevo 27 a, La modo kaj la mankoj de beleco 30 b, La naturo 2553 a, La nokta pluganto 6 a, La paradizo de l' korprofundaĵo 2478, La rakonto de Vaganta Vilĉjo 2008, La roko 2220 d, La rozo de Siras 2591, La saliko 2064, La sen-viva kampo 2569 b, La skoto en humoro 2603, Lasta rendezvo 36 b, La sirato (Altrejnano) 2493 b, La ŝarko 2519, La ŝtona ŝtuparo 2484, La tagoj de l' vivo 2593 o, La teruro 1 c, La unua (J. M. D.) 32, La unua amiko 2498, La unua eksedziĝo 29 c, La venkitoj 2620 a, La

verso 2593 i, Legendo de Edelveiso 2486, Letero el batalkampoj (Hahn) 2465, Lia filo 44, Lia idealo 2549, L. Tolstoj pri edukado 2521, Luneklipso (L. F.) 50.

Malantaŭ monaĥejoj muroj 2151, Malbonveninto 2452, Malfrua aŭtuno 2578 e, Margyul 2594, Mi demandis ŝin 2574 c, Mi pikus 3 a, Miskomprenoj esperantaj 1006, Moderna sfinkso 20, Montaj pintoj 2566.

Ne kantu 2593 d, Niaj pacaj batalantoj 28, Nokta sorto (P. B.) 2585.

Ora polvo 2578 f, Or-epoko 2516 g.

Penseroj (Teodoro) 2557, Petro Digan 2476 a, Printempaĵo (V. V.) 2620 e, Printempo (H. G.) 2551, Promalsata striko 2424, Promenado 49 b.

Reveno de la elmigranto 14.

Sankta Nikolao-Vespero 2554, Sankta Vendredo-Legendo 2464, Sentenco de W. W. 2604, Sep bonaj jaroj 2560 b, Sopirbildoj 2516 d, Spritaĵoj (Uljeŝtano) 17 i, Strangaj amuletoj 29 b, Strato 2620 b, Sub influo 2559, Super ĉiuj pintoj 2550, Superlativoj 1015.

Tasko aritmetika 2551 a, Tiu nokto 2573 b, Tri 2505 d.

Unu momento (V. A. Ti) 1 a, Unu momento (V. Ko.) 2611.

Vagemulo 2455, Vintra vespero 2440 b, Vizito pri vero 2457 a.

### Listo II.

#### Eventuale presotaj manuskriptoj.

Al mia ombro 2460 b, Ama dramo en la napolia patriarko 1016.

Divenu 2504.

Elparoloj kaj sentencoj 2497.

Filozofiaj tradukprovoj 2599, Frenézulejo kaj frenezeco 2525.

Haraldo 2567, Homera komparo 2525.

Infana naiveco 33.

Joĉjo „pri la ĉevalo“ 2701.

Kanto pri estinteco 39 a, Kanto pri falko 2488, Kiaj estas la junuloj 2469, Kial pepadus la kokino 2804, Kion ni lernis de la bestoj 2805, Kiu estas la mistera esperantisto „Karlo“? 2558, Kiu ne konas Esperanton? 2586, Kristnaskflamoj 2291.

La amindumado de la sinjoro de Dumbiedykes 2007, La antaŭlando de Bavaraĵoj Alpoj 2558, La birdo en la neĝo 2459, La greka kasisto 21, La kolĉeno de Maya 47, La korvo de la urbo Merseburg 2609, La mikrobo 40 c, La ovoj naskanta virkoko 24, Li perdis 2438, La pilgrimado al Keplar'o (H. J. B.) 2556.

Matematiĉa tasko (W. F.) 2606 a, Mia unua laŭmezura pantalono 2052, Murmuro de la floroj 2471.

Nokto 2495, Notindaĵoj el la historio de l' kuirarto 2579.

Paŭlo, kamparano 2516 f, Poeto 2442, Pri la mal-esilmantoj de l' korpo 37.

Robinhood kaj Sherwood'a arbarego 2457 b.

Sopiro de Pan 2460 a, Sorĉa stelo 3606 b.

Unuan fojon kun paĉjo al matenpreĝo 19, Unu sennoma homo, kiu parolas nur esperante 2550.

Versaĵo sen fino 2562, Vizito sur la Stelo 2392, Vorto ĝustatempe dirita 2483 d.

### Listo III.

#### Nepresotaj manuskriptoj.

Adiaŭo (M. S.) 2224 c, Alaiĉo 3152, Al kara tombo 2239 a, Al kongresurbo de XV-a 2502 b, Al la fratino foresta kaj malsana 2082, Al la homaro 2515, Al la urbo 35, Al muzo 2605 b, Al revemulineto 2067 c, Al T. M. 2595 n, Al tombo 39 b, Al virino (Soneto) 2249, Amo (Ho, kiel dolĉa) 2516 a, Amo pasinta 2083, Arbara reĝo 2220 a, Arhimajstro 2015 b, Armistice tago en London 2260, Atakoj de sorto 27 c, Aŭtobiografio de Ovidius 2585 a, Aŭtuno (S. J.) 2109 g, Bagatelajoj 3520 (Kvankam ni ne koleras al la verkinto pro la enhavo, tamen ni ne ŝatas publikiginti), Birdeto 2220 b, Bona rimedo por la dikiĝo 2094.

Charles Müller 2127.

Ĉe la maro 2150, Ĉesu, kukoleto 2109 f, Ĉies mi Dio ja estas 2449, Ĉinĉinuto 2129, Ĉu ekzistas perfekta feliĉo? 2194, Ĉu ŝtono aŭ pano? 2161.

De l' kantisto malbena 2105, De sur kurgano 2605 c, Doktoro Zamenhof (Kaz. V.) 1905, Droninto 2220 c, Du malamikoj 2620 c, Dum profunda vintro 26 a, Du ombroj 1019 a, Du poemoj en prozo 2242, Du teorioj 2065, Du vilaĝanoj 2593 l.

Eksperimento 2508, Ekvagante 2114 a, Ekzameno 2522, El Nikolao Klujev 2109 h, En abismo 2620 h, En gasciambro 2545 (nelegebla), Enkonduko en spiritalistaj fenomenoj 22 (en tiu fero neuzebila por ET), En la albumo 2509, En la krepusko de l' urbo 2570, En lasta horo 2454, En la vinberkampoj 2293, En malgajeco 2186 a, En vagono 2521, En vespero 2474, En vojaĝo 2115, Esperantida 2090 a, Esperanto tr'umfinta 2494, Eŝis . . . havis 17 e, Estu bena! 2084, Estu juna kaj estu bela! 2067.

Fabelo pri akvo 3 b, Fabelo pri ŝippereanoj 2100, Falo de iluzioj 2516 e, Fantazio (A. F.) 2489 b, Fiŝsupo de Demjan 2593 m, Floramo 2455, Floroj kaj kronoj 2522 b, Forflugantaj nuboj 3153, Frenezeco persistas 2423 c, Funcbras vin mi nun 10.

Ĝoju, ĝoju 26 b, Ĝusta edziĝo 2114 b.

Hagar en dezerto 36 a, Hanjo 2507 a, Ho, donu! 17 b, Hom' amini' 2553 b, Hungaraj anekdotoj 2156.

Intervjuisto vizitas Mark Twain 2483 e.

Jean Paul pri virinoj kaj amo 2204, Jehuda Hamakabi 2585 b.

Kantas jen la najtingalo 2088, Kanteto por Zinjio 2155, Kant', iafoje aŭdita 27 b, Kanto pri l' albatroso (Gorikil) 2077, Kapo kaj svisfromaĝo 2199, Kariero 2106, Kiamaniere mi rekonsciĝis pri mia ekintereso por Esperanto 2196, Kia tago 2544, Kiel ondo tiu ĉi 1900, Kien ajn mi venas 2239 d, Kien flugos vi, falketo 2285, Kikibjo 2244, Kio fariĝos el mi 2069, Kion faras la cikonio 2514, Komenciĝo de l' printempo 41 b, Konsideru 2322, Korfunebro 2445 a, Kristnasksonĝo en limbarbo 2597, Kun aŭ kontraŭ la rajto — mia lando! 2128.

La adiaŭiro de Childe Haroldo 36 c, La almozpetistino de Lokarno 2555, La amoleteroj 2450, La araneo, la muŝo kaj la abelo 2593 p, La aŭtuno (K. L.) 2285, La aŭtuno (V. V.) 2620 f, La birdoj en la kaĝo 2109 c, Laborista romano 38 a, La danĝeroj de la modo 30 d, La Danubo ekdensiĝos 17 g, La doganisto forprenita de la diablo 2080, La donaco de Fernando 2118, La dronulo 2593 c, La du bildoj 2086, La du poemoj 2181, La emblemo 2294 b, La esperantistino 2045, La fatalmano 2592, La fidelaj amikino kaj amiko 2534, La forpasanta vivo 2480, La fragmento el la korespondado 2078, La frangulo 2071, La frosto venkis 2520, La gasteto 2607, La granda salto 2139, La homa kulturo 1908, La humila majstro 2584, La japano 2404, La junka bastono 2051, La kameleono 2091, La kanto (Ĉi, plej bele) 17 a, La kato kaj la pasero 12 b, La kornikoĉaso 2055, La kunfratiĝo 2239 b, La kursoj en koto 2076, La Lakta Vojo 2054, La ludo 2555, La luno rakontas 2525, La lupo kaj la ŝafido (laŭ Krilov) 2593 k, La maljuna Leskov 1906, La malsovaĝa leono 2075, La Margreiter Franzl 2512, La masakro 2574 a, La miaj animoj 43 a, La najtingalo kantis 2114 c, La neekkonita horo 2121, La nigra korpa korvo 1018 b, La ofero vespera 2066, La ora ĉeno aŭ la surprizo 2141, La oro kaj la skribo 2099, La pano 12 a, La papilio (A. K.) 2090 b, La parohestro el Valljoynona 2549, La patro kaj la filo 2087, La perdo de l' aŭreolo 2444, La pluvo 48 b, La rabistejo 2102, Larmo 38 b, Larmo 2605 e, La rozeto 1018 c, La rozo (Kop.) 2095, La sekreto 2101, La sincera amo 45 b, La sklavino 2620 d, La skribaĵo 17 h, La smeralda pinglo 2142, La sola floro 2047, La solena rompadlo de l' glavo 2261, La sonoriloj plendas 2200, La sopiro 2067 b, La sorĉisto de Munloparko 2116, La stacidomo 2512, La tre stulta veto de J. of Kazimirsky 2522 a, La tri kisoj 2152, La triumfo de Zaviŝa la Nigrolo 2015 a, La turo de l' malsato 2072, Laŭva populokanto 2600, La ukraina nokto 2595, La uniformo 1903, La unua homo (Eia) 1906, Laŭdu la majstrojn 2573, La verda kantisto 2266, La vilaĝa najtingalo 2115, La violono mia 1018 a, La virino 48 a, La vivo floras (V. G.) 2585, La vivo foriras 2186 b, La vivo kaj morto 2068 d, Legendo (A. B.) 2569 a, Lirika momento de l' animo 2188, Lulkanto (A. K.) 2090 c, Lulkanto (el Sabastopol) 2593 r.

Malagrabla afero 3265, Malgranda feliĉo 3073, Malfeliĉa amo (G. G.) 3195, Maljuna sonoristino 3093, Marta vivo 17 f, Mevino 3245, Mia amatin' 38 c, Mia dometo 3516, Mia nokto 41 a, Mia nova ĉapelo 2483 c, Mia solena dimanĉa parolado 3098, Mia undino 2489 c, Miĥel 3062, Militkamarado N. N. 3119, Miŝitpreĝo de Mark Twain 2483 f, Miozoto 1904, Miraklo 3527, Miŝtag Lefler 3157, Mori' d' Arthur 3274, Multprofiita entreprenno 3162.

Najtingalo (A. P.) 2109 b, Neĝulino 2109 a, Ni estas geaktoroj 3191, Nova rekordo 30 c, Nubajo en pantalonino 3097.

Oh, ierteguloj 3548, Okazas foje (M. K.) 2599 c, Okazintaĵo 3490, Oraj pensoj (Arl.) 1902.

Penseroj (Ofte mi meditis) 5581, Pensoj de Anatole France 3001 (bonega stilo, sed traduko de traduko), Pjero 3112, Poezio (A. H. S.) 3126, Poezio (El Nadson) 2605 a, Pro kio? 2067 a, Por memoro de A. Grabowski 3012, Por niaj etuloj (el germana kantaro) 2, Por vi 1019 b, Post karnavalo 3079, Postsaluto al mia amiko 3554, Preĝo 3140, Printempa okazintaĵo (Printempa flirtulo) 3441, Printempo (V. L.) 1907, Printempo? — Jes 3050, Pri strangaj bongustaĵoj 3198, Pythagoraj maksimumoj 3159 (iam aperis en alia gazeto).

Rajdas sur azen' paŝtisti' 3057, Rememoro (M. S.) 2224 a, Rememoro 3531, Revo (J. M.) 2505 b, Respondo (K. L.) 2594 b, Resono 2505 a, Romancoj (V. V.) 2589 d, g, Rozo kaj koro 2224 b.



Salutoj al Nürnberg 3317, Scienca heroeco 1018 d, Senverigita plano 3319, Sen vorj mi anas 2553 b, Sen vortoj superflujaj 3472, Sicelides Musae 3422, Silenta amo 3155, Siminulso 3555, Soldata enigmo 3058, Somera bildo 3081, Somera preludo 2505 c, Somertago 3461, Sono de Brahmō 1901, Sopir' (Vidante ardan okulojn) 17 c, Spite ĉion 3252, Spleno 3091, Stjenka Razin 3282, Striko (K. L. L.) 3138, Supreniro de l' suno 2605 d, Sur rivero 2501 a.

Sarado 3061, Si ekkantis 3060, Ŝtelisto 3104. Tie, malproksime 3540, Tifo 3055, Tombo de antikva soldato 2616 aa, Tombo-surskribo en Romo 2179 b, Triloj 2109 e, Triobla mortigo al monaĥino 3137, Trioleto (G. D.) 3110, Turmentaj minutoj 3524.

Vanja kaj Olja 3059, Veno de printempo 2516 c, Versaĝo de Umanov 2620 g, Vespero en Lakedemonio 3111, Vinberrikolo 2294 a, Vintra vespero 8 b, Vireto kiel ungeto 2109 d, Viv' 17 d, Vivo 3180.

Bibliografio.

Modernaj Robinsonoj, de D-o T. Schwartz, 12x16 cm, 88 pg. broŝurita, eldonis „Literatura Mondo“, Budapeŝt VI, Andrassy-utca 81.

La verketo enhavas interesan priskribon de la suferoj kaj danĝeroj de vojaĝo ferita de forkurianta militkapitano. Specialvaloron ĝi havas por sia originaleco. Lnu el la partoprenintoj estis la aŭtoro mem. Mi nur konas unu alian samenhavan libron en angla lingvo (nun ankaŭ en germana lingvo) „Bestoj, homoj, dioj“ kiu simile priskribis la suferojn. D-o Schwartz estas bona kaj talentita rakontisto. Multaj konas lin de Nürnberg kie li konkludis en la prezentadoj de hungaraj samideanoj.

La presoj kaj arango de la libro estas bonaj kaj tre modernaj. La broŝurado mem devus esti iom pli bona.

Ĉiukaze la libreto devas troviĝi en la mano de ĉiu esperantisto, kiu deziras legi iun bonan kaj originalan. La lingvo estas bona, la frazoj klaraj. Mi nur trovis kelkajn preserarojn kaj malkorekte uzitajn vortojn evidente laŭ germanlingva influo. La aŭtoro parolas pri „fizika laboro“ anstataŭ pri „korpa“ kaj pri „fortekonomio“ anstataŭ „fortoŝparo“. La vorto „patrono“ erare estas uzita por „kartuĉo“ kaj verŝajne nekomprenata de multaj samideanoj. Dua, espreble ba'daŭ aperonia eldono ebligas forigon de tiuj mankoj.

Komunisto movado, historia skizo, 15,5x28 cm, 50 pg. broŝurita, eldonis SEU, Moskva 1924 (edro supre). La broŝuro enhavas sciindajn detalojn el la komunisto movado laŭ Kalendato de la Komunisto por 1925. La verketo pligrandigas la vicon de praktikaj verkoj, aplikantaj Esperanton por iu celo. Presoj kaj arango estas bonaj. Surprizis min tamen, ke la libro estas presita sen superŝajna literoj, dum en Ruslando jam dum paco ekzistis preseroj ne sole havantaj akcentilerojn, sed eĉ matricojn por maŝinkompostado. Tiu ĝi fakte povus facile esti uzata por kontrabatali Esperanton, kvankam en praktikoj oni nun preskaŭ ĉie, eĉ en tre malgrandaj presejoj povas presadi Esperanton.

Esperanto Grammar & Commentary, de Cox, 10,5x16,5 cm, 371 pg. broŝurita kaj bindita, eldonis BEA, London.

En kvara reviziita eldono aperis tiu ĉi bona gramatikulo. Multe pli ampleksa ol similaj aliaj verkoj ankaŭ ĝi celas instrui Esperanton en ĉiuj detaloj. La aŭtoro dediĉas tutaĵn ĉapitrojn al laŭstistema lernado de la lingvo-eroj de Esperanto. En suplemento oni trovas krome modelajn frazojn, konversacion, plej uzatajn vortojn kun itala traduko ktp. Tiu ĝi fakte povus facile esti uzata por kontrabatali Esperanton, kvankam en praktikoj oni nun preskaŭ ĉie, eĉ en tre malgrandaj presejoj povas presadi Esperanton.

Dizionario Italiano-Esperanto di G. Meazzini, Terza edizione, 9,5x15,5 cm, 441 pg. bindita, prezno ne montrita, eldonis Raffaello Giusti, Livorno.

Tiu, kiu konas la strangan lingvo-tendencon montritan de la aŭtoro, estos surprizita vidi libron en tute bone Zamenhofa Esperanto. Mi zorgeme trafollumis la vortaron kaj nur trovis malgrandan vicon da vortoj ne trov-eblaj, sed evidente internaciaj kaj korekte reproduktitaj; fonetike por tio la libro havas grandan valoron por ĉiu itala esperantisto. La ekstera arango estas tre bona, la presoj kaj cetera arango eĉ bonega. En itala antaŭparolo la aŭtoro klarigas siajn ideojn pri la evoluo de Esperanto. Intere estas konstati, ke, kvankam li en ekstrem-e tro ofte koincidas kun Christaller, li kritikas kelkajn principojn de tio vortaristo. Evidentiĝas per tio, ke estas nepre necese iri la mezan vojon kaj lasi dediĉita la praktikon. Se la aŭtoro ĉiam uzos la vojon surpaŝitan en la vortaro, li ne estos pli atakata de Zamenhofanoj kaj iom post iom ekkonos, ke la ekstremeco neniel kondukas al la celo. Ni esperu, ke la dua parto de la libro (Esperanto-itala) havu saman tendencon.

Täydellinen Suomi-Esperanto Sanakirja, plena vortaro finna-esperanta de Vilho Seitälä, 7,5x16,5 cm, 351 pg., broŝurita, eld.: Helsingissä Kustannusosakeyhtiö Otava.

Krom Grosjean-Maupin kaj Christaller nun Seitälä verkis ampleksan kaj ĝis nuna tempo kompletigitan vortaron naillingvan-esperantan. La nombro de paĝoj montras jam eĉ al nenio la grandan laboron faritan de Seitälä, la senlaca direktinto de la kongreso de Helsinko, kiun oni konsideras naskita esperantisto, aŭdante lin majstri nian lingvon. Ne estas dubo pri tio, ke la verko estas bona. Multjara sperto de Seitälä garantias tion. Ĉiukaze lia verko meritas esti diskonigata en eksterlando.

Por finlandanoj ĝi ŝajnas al mi nepre necese. Esperanto-Servo R. Eichenbaums un K. Strazde, Jelgava, Latvio. 4-paĝa prospektio pri Esperanto kaj verkoj haveblaj de la Esperanto-Servo. Latvoj povas faciligi al si la aketon de libroj, mendante per la Esperanto-Servo.

Esperanto Hrvatski Srpski Rječnik. Potpuno Službeno Izdanje (Esperanto-Horvata Serba Vortaro, Oficiala Radikero) de Niko Bubalo. Eldono de Sudslava Esperanto-Servo, Zagreb 1923. 148 pg., 11x15 cm.

Post kiam ĉiuj antaŭe eldonitaj Esperanto-vortaroj por sudslavoj estas elĉerpitaj, la malnova samideano en Bosnio eldonis ĉi tiun nun aperintan. Ĝi enhavas la fundamentajn vortojn de D-o Zamenhof kaj ĉiujn oficialajn el la tri aldonoj de nia akademio. Ĉiuj devenigitaj vortoj kaj tiaj kiel scienca signifo estas detale klarigitaj. — La libro sendube faros grandajn servojn al niaj sudslavaj amikoj.

En la Fino de la Mondo (Friedebert Tuglas) el estona lingvo tradukita de H. Seppik, 15x20 cm, 56 pg. Prezo 1 sv. fk. Eldonoj M. Tamverk, Esperanto-fako, Haapsalu, Estonio.

Pepli kaj Huhuu, novelo (Friedebert Tuglas), el estona lingvo tradukis H. Seppik, 15x20 cm, 32 pg. Prezo 1 sv. fk. broŝur. Eldonejo kiel supre.

Ambaŭ verketoj estas komenco de laŭkrede regule aperanta biblioteko markara en Esperanto. H. Seppik, konata estona samideano, tre bone tradukis la du verkojn de fama Tuglas, kies originala enhavo devas allogi la interesatojn de estona literaturo. Preso, papero, arango estas bonaj. La dua estas iom malpli bona. La eksteraĵo estas simpla, sed bela. Seppik estas bona lingvisto. Li tamen uzas kelkajn neologismojn kaj vortojn laŭ Verax, kiuj tute ne estas aprobindaj. Dua eldono sendube ebligos forigon de la superfluaĵo Gazono. Razeno (unu el ambaŭ, ĉar ambaŭ havas saman signifon), nana = eta, regresi = reiri (teknike retroiri), ŝminki = kolorigi la vizaĝon.

Albrecht Dürer, Vivo kaj verkado de la fama pentristo, 29 bildoj pri liaj verkoj kun biografio kaj klarigoj de Hans Koch, München, 14x22 cm, 48 pg., glazurpapero, broŝur. Prezo 1.40 ormk. (0.25 \$). Sudgermana Esp. Eldonejo Oskar Ziegler, Deisenhofen bei München. 1924.

Jam antaŭ la milito aperis luksa verko pri Albrecht Dürer. La eldonoj de Koch evidente celas forigi la mankon de la ne pli havebla antaŭmilita eldono de alia entrepreno. La verko ebligas antaŭ ĉio vidigi al ne-esperantistoj la praktikan aplikon de Esperanto por disvastigo de la arto. Al esperantisto mem ĝi konatigas la ĉefajn verkojn de l' fama pentristo germana, kies domon vidis multaj vizitintoj de la kongreso de Nürnberg. Ekstera arango, papero kaj reproduktado de la bildoj estas modelaj. Mi juĝas rekomendinda la eldono de bindita volumo por konservadi la tuton.

Al eterna paco, de Immanuel Kant, tradukita de Profesoro P. Christaller, kun antaŭparolo de l' eldono D-o W. Fricke kaj kun parolo pri vivo kaj pensoj de Kant de D-o Th. Lessing, Profesoro de filozofio en Hannover, 12,5x18,5 cm, 88 pg., broŝ. rita, eldonis La Batalanto, D-o Fricke, Eldonejo, Hannover. Prezo 2 ormk. (0.48 \$).

Ius elvenis la Esperanto-traduko de verko de Kant kiu ni avizis en nia Kant numero. La nomoj de la tradukisto kaj de liaj helpantoj garantias plej bonan laboron. Eksteraĵo, prezno, papero ktp. estas vere modelaj. La verko estas des pli salutinda, ĉar ĝi ne sole peradas la teorion de granda sciencisto germana, sed eĉ ĝi estas denova verko praktik-e aplikanta Esperanton. Oni devas esperi, ke baldaŭ aperos multaj similaj verkoj. La tradukisto aldonis je la fino de la libro liston de specialaj vortoj ne-muldekonataj. Tiu ĉi procedo certe taigos por la komenca tempo de praktika aplikado. Poste oni preferu forlasos tiun ĉi sistemon, kiu povus ŝajni malperfekteco de na lingvo aŭ mankon de fak-vortaroj (kiu nun fakte ekzistas). Ne estas necese laŭdi la tradukon mem. La tradukisto estas bone konata vortaristo.

Mi devas tamen kritiki la uzon de kelkaj pliaj (ankaŭ en la listo menciitaj) neologismoj tute superflujaj: animalo = animalara, devota = tre sindona (kaj trege sindona?) fantasta = fantazio, gaulo france gaulois (goli, galiano), hasta (1) nerveze rapida (kial ne nervezo?), kategoria = nepre, konkiri = konkiri. Tio tamen neniel influas la bonegan libron, al kiu oni devas bendeziri plej grandan disvastiĝon por la enhavo kaj por Esperanto mem.

Esperanto kaj Interlingva. De B. Migliorini. 16 pg., 17x21 cm. Eldonejo: A. Peolei, S. Vito al Tagliamento, Italio.

La dulingva broŝuro (itala kaj esperanta) enhavas komparon de la lipaj formoj de „Interlingva“ (Latino simpligita) kun Esperanto. Per leria scienca argumentado la aŭtoro venas al la konkludo, ke „Interlingva“ estus eventuale akceptebla, „se la problemo de lingvo internacia concernus nur elekton de lingvo por puraj sciencoj“, sed ĝi ne sufiĉus por praktikaj rilatoj, eĉ ne por la tekniko. — Por ĉiuj interesitaĵoj pri la problemo de lingvo internacia entute la broŝuro de D-o Migliorini estos tre valora.

La Tragedio de Reĝo Lear. De William Shakespeare. El la angla lingvo tradukis A. L. Curry kaj A. J. Ashley, 1924. 170 pg., 12,5x18,5 cm.

King Lear, la majstroverko de Shakespeare en Esperanto! — Estis giganta laboro, kiun la anglaj tradukintoj riskis. Ni gratulu ilin por la fin sukceseo, vana verko el la angla literaturo en esperanta vesto, kiu trovos lokon apud Hamleto de Zamenhof. — Malfacile komprenebla estas la lingvo Shakespeare' a kaj multsignifa la enhavo de la versoj. Tamen ni ĝuas la grandajn vortojn de l' originalo plejebte trafite tradukitajn. Ne iro severe oni taksu aŭ juĝu la frazerojn laŭ gramatikaj proza vidpunktoj; sed mi devas konstati, ke pluraĵ strangaĵoj povis esti evititaj. — Sendube la granda tragedio entute estas internacie konata; la tradukintoj supozis same, ĉar ili estis tre ŝparemaj je klarigaj notetoj. — Menciinda estas la limo de sudangla dialekto en la kvara sceno (Edgar). — Brila estas la lingvo en la ventego-sceno, emociigaj la teruraj vortoj de la patra malbeno. Majstre pentrita en la traduko estas tiu sceno, kaj ne malpli la finsceno. — Papero kaj presoj (ĉar Germanujo farita) estas tre bonaj; kelkaj preseraroj ne estas tre gravaj. — Entute: dankinda faro de niaj anglaj samideanoj kaj nio admirinda verko en nia esperanta mond-literaturo.

M. Butin, L. K. Vocabulario Commune ad Latino-Italiano-Français-English-Deutsch per usu de interlinguistas per G. Penano. Editione II. 639 pg. broŝ. 16x28 cm, eldonis: Academia pro Interlingua, Cavoretto-Torino. Prezo 8 fk. (svis. ?)

„Vocabulario Commune ad linguas de Eŭropo“ ne estas Esperantajo sed bonega utilaĵo ankaŭ por la esperantistoj. Oni devas juĝi ĝin senpartie verko neutrala, gravega fidela dokumento de lingvistiko. La aŭtoro tute nek celis, nek pretendis prezenti novan projekton de speciala interlingvo, ĉar la parolo „Interlingua“ aŭ „Lingua Internationale“ ampleksas Volapük, Esperanto, l'io ktp. El tiuj „Latino sine flexione“ estas unu formo.

„Vocabulario Commune“ ne estas leksiko de unu lingvo internacia, sed rika kolekto da vortoj kies inter-nacoecon oni determinas por la uzado ĝenerale de interlingvistoj por kiuj ĝi estas speciale kompilita.

J. M. i.

Esperanto-gazetoj.

Argus, Mexico D. F., majo-junio, kun kelkaj redio-notoj, leginda daŭrige de artikola serio de s-o Guarraga pri antikva Meksiko.

Esperanto, Banjocwangi (Javo) Propaganda organo de la Nederlanda-Hinda Esperanto-Uniigo, novembro-decembro, januaro.

Celas diskonigi la progresojn de Esperanto en nederlanda lingvo inter la loĝantaro de nederland-hinda Insularo. Por la kreskanta intereso de malajoj pri Esperanto tre subteninda.

Der Arbeiter Esperantist, Leipzig-Thonberg, Wasastraße 16, pt. junio, julio, i. a. kun protokolo pri la ligotago de G. L. E. A.

La Interligilo de l' PTT, Paris, aprilo, majo, junio, nepre rekomendata al PTT-uloj.

La Progreso, Praha, aprilo, majo, junio, pliampleksiĝis lastatempe kaj per tio montras la plifortigon de ĉeĥa movado.

Speciale atentinda „Lingva fako“ kun vortaro Esperanto ĉeĥa de s-o Hromada.

Svenska Arbedar Esperantisten, Göteborg, majo, ilustrita. La Verda Lumo, Shanghai, Organo de hina esperantistaro, jan-aprilo. Tre leginda gazeto. El la enhavo: Bagatelo el hina vivo de K. C. San, Analizo de frazo (kun skizoj). Kelkaj similiaĵoj inter Esperanto kaj hina lingvo, de Won Kenn.

Suda Kruco, Melbourne, marto, aprilo, kun kroniko de Aŭstralio.

Export Esperantist, Chicago, Ill. jan., febr. kun nure komerca enhavo.

International Language, London, atestas la intensecon de angla propagando. Maja numero dediĉita tute al radio-telefonio kun skizoj ktp. 22 paĝa. Junia numero kun raporto pri radio konferenco en Genève.

Radio-Servo (Internacia Radio Revuo), Locarno (Svislando) n-oj 1 kaj 2. Kun plurlingva informo aldono por radioamatoroj, grandformata, bona papero.

Oni devas gratuli por la iniciato. La gazeto sendube aliros la intereson de radiistoj al Esperanto. Abono nepre rekomendata. Ponomera prezo 0,10 dolaro aŭ ekvivalento.

La Stelo, Strasburg, aprilo-majo, informas pri la franca kongreso en Sir.

Luzacano observanto, Zittau, junio, julio. Taŭga distrikta organo.

Corriere Balcanico-Esperantista, Bari, n-o 22/35. Helpas speciale propagandi por Esperanto inter albanoj.

Le Monde Esperantiste, Paris 14e, jan-febr. Okupas sin kelkpartie pri interna organiza disputo. Anstataŭ kritiko kaj opozicio en la gazeto oni rajtas postuli laŭcelan kunlaboron por plibonigi la kritikan.

Vegetarano, Hamburg-Fuhlsbüttel, aprilo (trimonata). Vegetaranoj devas certe legi la gazeton.

Holandia Esperantisto, Amsterdam, n-oj 124-131. Aperas semajne kaj pliampleksiĝis lastatempe. La nederlanda movado do pligrandigas.

Sennacieca Revuo, Paris, kun aldono literatur-scienca, junio, julio. La eldoncifero de 7000 ekzempleroj pravas la fortecon de la laborista movado; ankoraŭ pli la fakto, ke la gazeto baldaŭ aperos semajne. La enhavo estas konforma al la stero, al kiu servas la gazeto. La aldono ŝajnas al ni iro faka en kelkaj artikoloj.

Laborista Sporto, n-o 1 Admin. Adolf Wendt, Leipzig-Stö., Lange Reihe 11-a. Nova kvarpaĝa gazeto speciale por la sportmovado. Modesta komenco, sed granda perspektivo. Ni varme rekomendas la gazeton al sportantoj-esperantistoj.

Espero Teozofia, Praha, aprilo-junio. Kun fino de ilustrita artikolo „La piramidoj de Teotihuacán (Meksiko)“.

Internacia Medicina Revuo, Budapest, n-oj 1-5 kun tute faka enhavo, tre rekomendinda al kuracistoj.

Internacia Stenografisto, Issy-Seine, junio, ĉefa artikolo: Stenografaj elementoj en Sanskrito.

Literatura Mondo, Budapest, aprilo kaj duobla numero majo-junio, ankoraŭ ĉiam rekomendas sin per si mem. Boletin del 20. Congreso de Esperantista Ibericos, Bilbao, Esperanto, Genève, majo, junio, en konata amplekso kun bone elektita enhavo.

Bulgara Esperantisto, Sofia, majo, informas pri la bulgara movado.

France-Esperanto, Paris, junio, kun ĉefartikolo franclingva: La utilo de Esperanto en la studo de franca lingvo. (Aldono Esperanto et Commerce.) Julio kun ĉefartikolo: La franca, lingvo internacia de Max Roube.

Völkerspiegel, Leipzig, n-oj 8, 9, 10. Denovaj privilejoj pri la amplekso kaj aktiveco de laborista movado esperantista.

Germana Esperantisto, Berlin, majo, junio, kun sciigo pri la radio-konferenco de Genève, la dekreto kaj rekomendo de germanaj ministerioj por Esperanto, fuŝagado de idistoj ktp.

Litova Stelo, Kaunas, febr.-majo kun leginda enhavo junio pri Litovio.

Informoj de Esp. Asocio de Estonio, Tallin, majo, junio, dediĉas sin mulpartie al stila evoluo de Esperanto.

Pola Esperantisto, Warszawa, jan-febr., marto-aprilo, majo. En marto-aprilo numero leginda artikolo pri lingva tendenco. Oni povus deziri ĝin malpli moka, sed pli realista por la graveco de l' temo.

La Movado, Paris, majo, junio, kun interesa sinopijka karto pri radio-disvastigo en Eŭropo. En junia numero, krome ĉefa artikolo „Esperanto kaj la parlamento“ (franclingve) de s-o Godari, deputito de Rhône, nuna ministro.

L' Esperantista Catalá, Barcelona, majo, plejparte katalune, ilustrita.

Amerika Esperantisto, Boston, Mass., marto, aprilo-majo, disponas pri multa loko kaj povus esti pli plena. Ankaŭ la stilo kelkfoje devus esti pli bona.

Movado (Finlando) Helsingfors, majo, bedaŭrinda fakto, ke por internaj disputoj la forta finlanda movado ne plu havas ampleksan gazeton.

L' Antinationaliste, Paris XX. Franclingva propaganda gazeto por Esperanto en proletaria medio, junio. Ĉefartikolo: Esperanto, lingva vivanta kaj literatura de Chas. Baudouin.

La Suno Hispana, Valencia, majo, junio, raportas i. a. pri reorganizo de hisp. movado, Brita Asocio por Progreso de Scienco ktp. (dulingve: kastile kaj esperante).

Arbeiter-Esperantisten, Kristiania, nove fondita organo de norvega esp. laborista federacio, n-o 1. Espreble la gazeto estos vivkapabla.

La Semiso, Sabadell, majo, raportas i. a. pri radio-konferenco de Genève.

Marto, Haida, majo, junio, informas pri Wien, 2. Ĉeĥoslovaka konferenco ktp. Oficialaj informoj de la Ligo de germanaj esp. en Ĉeĥoslovakio.

Itala Esp. Revuo, San Vito al Tagliamento, majo numero dediĉita al kongreso itala en Torino, multaj ilustraĵoj ktp. Raporto pri radio-konferenco en Genève.

Literaturo, London, aprilo-junio, n-o 22. Rimarkinda lingva kritiko.

Informilo de Esp. Kartelo, Berlin, majo.

Konkordo, Zagreb, aprilo, kun detala artikolo pri Sudslava Kongreso en Split.

Novaj tempoj, Leipzig-Connewitz, majo-junio. Tre leginda por instruistoj, pedagoĝoj ktp.

Tra la Esperanto-Literaturo, Dresden, junio. Enhavas detalan recenziĝon severajn pri la lastatempe aperinta tre ampleksa literaturo en Esperanto. Rekomendinda al libro-amantoj.